



Esperanto en Danio

21-a jarkolekto • n-ro 3 • aŭgusto 2014



Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

Adreso de la asocio/prezidanto:

Ileana Schrøder

Vestavej 4, 2770 Kastrup

☎ 32 51 31 16 dea@esperanto.dk

Ĝirokonto: 1551-805 7370

UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Arne Casper Mortensen (kasisto)

Finn Østerbæk (vicprezidanto)

Jens S. Larsen (sekretario)

Bent Jensenius

Peter Wraae

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen

c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77

2770 Kastrup

☎ 52 64 44 72 eed@esperanto.dk

Presado:

DDFO

Adresŝanĝoj al:

La prezidantino (adreso supre)

Represo de artikoloj el EeD estas
permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

01.11.2014

Enhavo

Someraj eventoj kaj reflektado
3

Kora akcepto en Montevideo..4

La UK en Bonaero.....7

De alia partopreninto.....9

Pri la Somera Esperanto

Studado.....10

La Popolkunveno.....11

Kopenhagaj okazontaĵoj.....13

UEA ĉe UN pri indiĝenaj lingvaj
rajtoj.....15

10-a EEU-Kongreso.....17

Gustumi la mondon.....18

Packoncerto.....19

Nova retpaĝo.....19

Recenzo.....20

Laste aperis.....21

Artaj konfrontoj en Pollando.22

Vivtragedio de Zamenhof.....24


Esperanto-TV petas vian

helpon.....26

Vikipedio atingas 200.000

artikolojn.....27

Someraj eventoj kaj reflektado



Kelkaj el la plej gravaj renkontiĝoj de la jaro jam pasis, kaj mi povis konstati ke la informado de tiuj eventoj al la cetera movado ege pliboniĝis. Precipe en la vizaĝlibro, sed ankaŭ pere de retmesaĝoj ni estis informataj kaj povis sekvi la eventojn. Pluraj el niajn membroj partoprenis tiajn aranĝojn, kion oni povas konstati legante la diversajn artikolojn. Jen certe la pozitiva flanko

de moderna komunikado. Sed kion pri la iom malpli pozitiva flanko? Fakte estas ke la membraro malaltiĝas ne nur en nia lando sed ankaŭ ĉe UEA, kiu plendas kaj instigas al membriĝo. Kelkfoje oni havas la senton ke precipe la junuloj, sed eble ankaŭ la personoj kiuj lernis mem ĵus pere de la reto, povas hodiaŭ deteni sin fariĝi membroj kaj pagi kotizon, ĉar oni multe pli facile povas trovi rete ĉiuspecajn informojn, kaj povas ĝui la aranĝojn aliĝinte al internaciaj eventoj, ne kontribuante al la movado pere de kotiza membriĝo.

Oni diskutis tiun temon en la retejo de UEA, kaj alvenis pluraj proponoj, kiujn la estraro de UEA pritraktos. Mia opinio estas ke unu el la plej motivigaj spertoj estas, kiam la personoj kiuj dum iom da tempo lernis nian lingvon, partoprenas por la unua fojo internacian aranĝon. Tiam ili vere spertas la internacian etoson. Sed oni devas elekti la ĝustan aranĝon, ĉar ofte komencantoj ne emas partopreni tiujn aranĝojn, timante ke ilia kompreno ne sufiĉas por partopreni eksemple gravan kongreson. Pli fruktodone estas do, rekomendi la partoprenon en SES, kies programo donas al partoprenantoj la ŝancon trovi sian ĝustan nivelon kaj samtempe lerni kaj amuziĝi!

Alia kategorio de membriĝo donus rapidan kreskon: la membriĝo de subtenantoj. Se ĉiu nia membro povus trovi nur unu subtenanton, ni subite duobligus nian membronombron. Ĉu realigeble? Pripensu mem, karaj membroj, kaj agu!

Pri unu el la venontaj eventoj, la UK en 2015 en Lille ni povas jam nun prepari nin. Mi certas ke tiu jubilea kongreso estos escepte multnombra. Verŝajne ankaŭ la UK en 2016, ĉar ankaŭ ĝi okazos en Eŭropo, nome en Nitra, Slovakio.

Ileana Schrøder

Kora akcepto en Montevideo



Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) estis akceptita de la urbeŝtrino de Montevideo en la Nacia Parlamentejo

En impona italstila palaco, longa, vasta salonego kun marmoraj kolonoj, altega plafono kun koloraj vitraj fenestroj – jen la ejo de la Ĝenerala Kunsido de Unesko en novembro-decembro, 1954. Tiu salonego okupas la tutan larĝon de la ‘Leĝa Palaco’, la duĉambra parlamentejo de Urugvajo.

En tuj apuda, same impona salono ariĝis naŭdeko da anoj de la 47a Konferenco de ILEI, plus gastoj kaj lokaj helpantoj. La prezidantino de ILEI, s-ino Mirejo Grosjean bonvenigis la konferencanojn, prezentis la podianojn kaj honorajn gastojn. Elstare inter tiuj estis la urbeŝtrino de Montevideo, s-ino Ana Olivera. Plie du reprezentantoj de la Regiona Oficejo de Unesko en Montevideo, inter kiuj la direktoro, s-ino Lidia Brito. Krome la Vic-ambasadoro de Svislando en Urugvajo.

La urbeŝtrino deziris al ni sukcesan kunvenadon kaj kore bonvenigis nin al Montevideo, ĉefurbo kun 1,4 milionoj da loĝantoj. Ŝi montris klaran simpatian por nia lingvo, klarigante, ke ŝi ekkonis ĝin jam en junaĝo, ĉar tre influa lerneŝtrino de ŝia liceo deklaris: “Estus bone, se estus komuna lingvo, uzebla por ĉiuj personoj”.

La direktorino de la Unesko-oficejo (kiu zorgas pri scienco tra la tuta Sud-

Ameriko kaj Karibio, kaj prizorgas ĉion de Unesko en Urugvajo, Paragvajo kaj Argentino) emfazis la edukajn laborojn de Unesko kaj la grandecon de la problemoj de malegaleco, malriĉeco kaj malpaco, kiun eblas superi nur per pli fortaj programoj kaj klopodoj. Ŝi bone sentis la lingvan dimension en la evolulaboroj kaj konsentis, ke Unesko kaj la Esperanta movado dividas multajn komunajn valorojn.

Interese, ke nur en nia konferenco, la direktorino de la Unesko-oficejo en Montevideo unuafoje renkontis kaj kore salutis sian urbestrinon.

Poste la vic-prezidanto de UEA en sia saluto diris la sekvon:

Nome de Universala Esperanto-Asocio mi kore dankas al la reprezentantoj de Urugvajo, de Montevideo, de Unesko kaj la diplomatoj pro la partopreno en nia solenaĵo kaj pro la digna kaj impona akcepto kiun ricevis la Konferenco de niaj instruistoj.

La rekono de Unesko al la lingvo Esperanto antaŭ 60 jaroj ludis difinan rolon en la historio de nia lingvo. Ni refoje emfazas, ke temas pri vivanta, funkcia lingvo kun aktiva tutmonda parolkomunumo.

La lingvo kapablas ludi valoran rolon en interkulturaj kontaktoj; ĝi ne nur havas propran kulturon, ĝi plie efike servas kiel ponto inter plej diversaj kulturoj, kaj farante tion, kontribuas al la protektado de multlingveco en la mondo.

Dum nia Konferenco ni certe diskutos tiujn temojn. Nome de UEA mi deziras al ĝi plenan sukceson.

Tradukadon kapable faris tra la tuto Ana Montesinos de Gomis kaj Duncan Charters. La disponigo de la nacia parlamento kaj al altiro de tiom alt-rangaj gastoj estas la merito de la loka konferenca teamo, sub gvido de s-ino Sonia Risso. Antaŭ la pluiro al du dudekminutaj pritemaj prelegoj farotaj nur en Esperanto, la honoraj gastoj ricevis inviton forlasi la salonon, kaze de aliaj devoj. Laŭdinde, ili ĉiuj restis, kaj laŭ la reagoj, evidente komprenis kaj aprezis multon.

Unue, Marija Jerković el Kroatio prizorgis lumbildan prezenton pri la preparlaboroj ekde la 7a Ĝenerala Konferenco de Unesko en Parizo en 1952, por veni al la punkto povi en Montevideo du jarojn poste akceptigi kunlaborajn rilatojn inter UEA kaj Unesko. Pri tio oni frue sukcesis, sed

favora rezolucio pruviĝis pli defia. Necesis unue trovi subtenan delegacion. Post multa laboro, la meksika delegacio konsentis prezenti proponon, sed ĝi estis malakceptita, ĉefe pro la detrua kaj moka interveno de prof. Blinkenberg el Danlando, kiu interalie aludis negative al urugvajaj menuoj. En tri-minuta reaga interveno, malfacilis restarigi seriozecon kaj favore prezenti Esperanton. Tio ŝajnis la fino. Sed ne. La loka helpa teamo laboregis, ĉiutage aperigis en la urugvajaj ĵurnaloj artikolojn favore al Esperanto, tiel ke la malakceptita rezolucio fariĝis nacia diskutpunkto. Lapenna mem donis radian intervjuon, persiste lobiis inter la delegacioj kaj aranĝis kunsidojn kun altranguloj. La lumbilda prezentaĵo donis, tra la lastaj tagoj antaŭ la konferenca fermo laŭhoran, poste laŭminutan resumon de la rimarkindaj eventoj kaj atingoj, kiuj kulminis en eksterordinara revoĉdonigo de la rezolucio en la fina ĝenerala asembleo, kun bele pozitiva rezulto.

La dua prelego provis doni pli vastan kuntekston al tiuj dramecaj momentoj. Mirejo Grosjean skizis la decidajn mejloŝtonojn de Esperanto ekde 1859 ĝis la nuntempo, en kiu 1954 evidente ludas grandan rolon. Ŝi tion klare kaj elokvente prezentis, fine tirante el la historio kaj de la ag-principoj de Lapenna mem, receptojn por nia estonta agado, interalie ĉe Unesko.

Post tiu duhora solenaĵo, la konferenco ricevis gvidatan montradon de la parlamentejo, inkluzive de la imponaj kunvenejoj por la 99 deputitoj kaj la 33 senatanoj. Tuj ekstere de la palaca placo, sur herbejo apud trafikata avenuo, la konferenco rajtis kolektive planti gujavan arbeton, kiun esperantista ekologo jam kreskigis el semo. Antaŭ la arbo estis solene malkovrita digna ŝtonplako kun teksto: ‘Esperanto kaj Unesko – ligitaj tra sesdek jaroj – 1954-2014.’

Memorinda mateno por ILEI kaj por Esperanto entute.

Stefan MacGill
(fotoj de Mireille Grosjean)




La UK en Bonaero

26-hora flugado povas deteni grandan parton da homoj partopreni, sed konsiderinda kvanto da penicilino (pro komenciĝanta vezika inflamo) kaj diversaj glasoj da ĝino kun toniko zorgis ke mi dormis fakte dum la tuta vojaĝo, kaj mi rekomendas tion!



Ne ĉeestis tiom da kongresanoj kiel kutime, sed tamen estis ege bona kongreso. Krom la tradiciaj prelegoj, fakaj kunvenoj, instruado, koncertoj ktp., ni rimarkis ke ni alvenis al Argentino. Okazis tango-instruado en granda stilo, kaj precipe Jytte estis populara, kaj tute ne mankis al ŝi dancpartneroj!



Argentino estas lando kie oni precipe manĝas ege multe da viando. Oni ricevas duonan parton de bovo sur la pladon, kun minimum parto da legomoj. Ege alloge por virhomoj!



Alia novaĵo dum la kongreso estis futbala matĉo, Esperantista teamo esperantistoj kontraŭ teamo de la argentina armeo. La subskribinto ĉeestis, precipe por rakonti al siaj gefiloj kaj genepoj ke la avino ĉeestis futbalan matĉon en Argentino mem!



Estis ege amuze. La etoso estis preskaŭ brulanta, kaj estis precipe amuze vidi la “jakportantojn” de la Estraro, La Kongresa Komitato kaj la Centra Oficejo kondukti kiel malgrandaj lernejnaboj. Ili kriis kaj dancis kun la verda flago ĉiufoje kiam la Esperanto-teamo enpafis golon.

La matĉo estis organizita kiel vera matĉo kie la teamoj faris paroladon kaj oni kantis la argentinan nacian kanton. Ni aliaj kantis kompreneble la Esperantan himnon!

Estis simple tiel amuze ke, eĉ se ni kompreneble malgajnis (8-3), ni estis fieraj de la 3 goloj kiun ni ricevis. Ni opiniis ke tio estas ege bona rezulto, pripensante ke nia teamo piedpilkis kontraŭ teamo de soldatoj, kiuj estis bone trejnitaj kaj kutimas



ludi. La Esperanta teamo havis nur kvar tagojn de trejnado, se ili entute trejnadis. Se tiu iniciato fariĝas tradicio, mi volas denove partopreni piedpilkon matĉon. Tie oni estas kune kaj babilas inter si tute alimaniere ol dum la kongreso.

Ni havis ege bonan semajnon, kaj loĝis vid-al-vide al la kongresejo, en maniero ke ni povis forkuri hejmen kaj ripozi antaŭ la ĉeesto en la vespera programo. La prezoj estis moderaj, kaj oni povis ricevi sufiĉe grandan pladon por ĉirkaŭ 50 danaj kronoj. Mi jam nun antaŭĝojas partopreni la venontan kongreson en Lille en Francio.

*Ĉie kreskas la afero
Ĉe bonventa Bonaero.
Kie tango de l'espero
Daŭre dancas dum vespero!*

Liss-Lotte Talbro (tradukis IS)

De alia partopreninto

Mi supozas, ke ni estis ĉ. 600 partoprenantoj el 50 landoj. La inaŭguroj, nacia vespero kaj koncerto okazis en kinejo ne malproksima. Nia tuttaga ekskurso iris al bienejo, kiu servis al ni proprajn produktojn. Kelkaj el ili distris nin per ludoj kaj dancoj. Viro aktoris kune kun ĉevalo kvazaŭ paro. Tie estis impone multaj diversspecaj gajaj hundoj.

La argentinanoj bonvole helpis al ni. LKK-ano donis tango-lecionon. Lia pacienco sukcesis instrui al mi la bazan figuron. La teamo prezentis amuzan filmon de la dancado. En la informejo Petra Smidéliusz servis al ni. Ĉe la bankedo mi aŭdis, ke ŝi studas ĉe la universitato.

La balo estis bone gvidata de la diskoĵokeo Leo Sakaguchi, kiu vigle prezentis tre varian muzikprogramon. Ni spektis novajn dancojn. "Tiu similas al nia 'Den toppede høne'" diris Liss-Lotte al mi. Amuza komparo. La gvidanto de Akademio de Esperanto, profesoro Christer Kiselman ĝuis danci. Tiu cetere bone gvidis prelegojn kun diversaj agantoj. Ekzemple la juna Marcos Cramer sin prezentis.

Mi ĉeestis la du komitatkunsidojn. Danio havas Ileana kiel reprezentanton. Liss-Lotte estis ŝia anstataŭanto. "Kio okazos, se mi ne ĉeestos la lastajn du horojn?" ŝi diris al mi, pro deziro daŭrigi en kurso ĉe edukado.net. Mi senbrue transprenis ŝian lokon.

Prelegoj pri Argentino en 7 partoj: Francisco L. Veuthey prezentis unu el ili, faris densan raporton pri la politike bunta historio. Li havas radikojn el la nordokcidenta parto de la lando. Lia sveda avino siatempe elmigris tien.

Ni multe travivis kaj havis bonan kongreson. Dankon al Argentino kaj la UEA-gestabanoj.

Jytte Sunekær

Pri la Somera Esperanto Studado



Al Nitra, Slovakio alvenis ĉirkaŭ 150 personoj por lerni Esperanton dum la somera lernejo SES: Somera Esperanto Studado. Oni povis elekti unu el la kvin niveloj – de porkomencanta nivelo al tiu de pli spertaj lernantoj. La programo de la tagoj estis jena: lernado dum la antaŭtagmezo, posttagmeze oni povis elekti ekskursi aŭ ĉeesti prelegon, kaj vespere oni povis amuziĝi kaj babili.

La unuan vesperon oni testis niajn kapablojn por konstati la nivelon. Parte pere de iu formularo, kiu indikis kion oni atendas de la studento skribe kaj parole en la diversaj niveloj, parte per alia testado kun pluraj demandoj pri gramatiko kaj ĝenerala scio. Mi hezitis ĉu iri al la plej malalta nivelo aŭ al la sekva nivelo. Mi elektis la plej malaltan nivelon. Mi estis bonŝanca, ĉar eĉ se tiu estis la plej malalta nivelo, ĉiuj partoprenantoj havis konon kaj jam scipovis la bazan gramatikon.

La instruisto estis ege eminenta kaj la instruado okazis en mikso de ludo, grupa laboro kaj dialogo. Estis neniu speciala strukturo en la taga programo. La instruisto kaj la lernantoj interkonsentis pri la studado de tago al tago laŭ la bezono.

La plej granda travivaĵo por mi estis vidi tiel multe da personoj (de tiom

multe da landoj) kiuj fakte interesiĝas por Esperanto kaj ke estas vivanta lingvo, kiun oni povas uzi en sia taga komunikado.

Estis ege bone ke oni povis elekti vegetaran kaj veganan manĝaĵon. Mi elektis veganan, eĉ se tio signifis ke mia matenmanĝo estis iom teda, ĉar ĝi konsistes el nur blanka pano kun peco da tofuo kaj soja jogurto kun maizflokoj. Tio estis ĉio! Sed la vespermanĝo estis en ordo.

Entute bona travivaĵo. La somerlernejo estas bone organizataj de multe da entuziasmaj volontuloj kaj granda grupo da Esperanto-lernantoj. Mi povas varme rekomendi la restadon.

Kenneth Ibsen

La Popolkunveno



En la estrarkunveno de DEA ni interkonsentis daŭrigi nian partoprenon en la Popolkunveno en Bornholm (“Folkemødet”). Ni komencis partopreni lastjare pere de Jonas Dalmose, kaj laŭ lia informo, li havis bonajn rezul-

tojn. Por malaltigi la kostojn, ni partoprenas kadre de La Paca Ministerio (Fredsministeriet) kiu estas tegmenta organizo por asocioj kiuj apogas la ideon de paco. Ni partoprenas en ilia tendo, kio malpliigas la kostojn.

Oni povis prelegi en la tendo, kaj tio estis anoncita en la programo. La prelego ne altiris multajn aŭskultantojn, tamen ĉeestis grupeto de interesitoj kiuj faris bonajn demandojn.

Mi disdonis multajn broŝurojn al homoj kiuj preterpasis la tendon, kaj mi spertis grandan malfermecon ĉe granda parto de scivolemuloj, pli ol mi antaŭatendis. Surprize multaj personoj prenis la tempon por diskuti, kaj post iom da tempo ili rekonis ke la angla lingvo ne estas solvo por la tuta mondo. Multaj aŭdis antaŭe pri Esperanto, sed ili ne imagis ke ĝi daŭre ekzistas.

Plej amuze estis, kiam preterpasis grupeto da junuloj, kiuj ŝatis diskuti pri sintenoj. Ili memkompreneble prezentis la konatajn sintenojn, sed la plejparto de ili pozitive surpriziĝis pri sintenoj kiujn ili ne renkontis aŭ ne pripensis antaŭe. Tiaj situacioj donas laŭ mia opinio pravigon ĉeesti tiajn aranĝojn, ĉar Esperanto preskaŭ neniam estas menciita en televido aŭ gazetoj. La etoso en la tendo kaj ĝenerale estis tre bona, kaj tio alportas al la konkludo, ke tiaj aranĝoj estas bezonataj por homoj kiuj



ĝenerale havas streĉajn tagojn, en maniero ke ili trovas tempon por alfronti novajn ideojn kaj sintenojn kune kun aliaj partoprenantoj.

La vetero estis ege bela kaj suna la tutan tempon, kaj mia nazo estis preskaŭ memluma kiam mi forvojaĝis hejmen.

Peter Wraae

Kopenhagaj okazontaĵoj

La kunvenoj de Konversacia Esperanto-Klubo, Kopenhago, normale okazas en la Kulturdomo, Tomsgårdsvej 35, 2400 København NV, ekde la 19-a ĝis la 21-a horo. – Prezidanto kaj kontaktulo: Peter Wraae, telefono +45 6070 7969, retpoŝto peter@wraae.dk.

14/8 (Ĵaŭdo) Taga ekskurso.

Ni refaros la ekskurson, ĉar neniu venis laŭ mia unua propono en junio. Ni manĝos kune en Chilli Mili ĉe Rådhuspladsen je la 12-a horo kaj poste piediros al Botanisk Have kaj uzos la enirejon en Nørre Farimagsgade. La pliparto de la ĝardeno estas renovigita antaŭ nelonge, kaj pro tio aspektas tre bela. Bonvolu rigardi:

http://botanik.snm.ku.dk/haverenovation/kort/Oversigtskort_A4_EN_DELIG.pdf

18/8 Someraj rakontoj.

Bonvolu veni kaj rakonti iomete pri via somera ferio, volonte kun fotoj.

25/8 Filmo.

La filmo "Bonvenon al Nepalo" kiu prezentos al vi la unikan etoson en Nepalo, farita de la konata pola esperantisto Roman Dobrzynski dum Speciala Ekskuro 2014.

1/9 Lego kaj diskuto

Bent Jensenius gvidos.

Claude Piron: Psikologiaj reagoj al Esperanto p.1-4

<http://claudepiron.free.fr/articlesenesperanto/reagoj.htm>

anglalingve: <http://dok.esperantic.org/ced/psyres.htm>

N.B. Ĉiuj estas bonvenaj. Tiuj kiuj ne havas la tekston ricevas ĝin surloke.

8/9 Babila vespero.

Ne estas programo, sed ni ĝojos vidi vin.

15/9 Kvizo.

Ana Røsum gvidos.

22/9 Pri vojaĝo. Ann-Louise Åkerlund gvidos. Ŝi rakontos kaj montros fotojn pri sia vojaĝo al pacifika insulo 2014.

29/9 Denove pri Piron.

Bent Jensenius gvidos.

Claude Piron: Psikologiaj reagoj al Esperanto p. 4-8

<http://claudepiron.free.fr/articlesenesperanto/reagoj.htm>

anglalingve: <http://dok.esperantic.org/ced/psyres.htm>

N.B. Ĉiuj estas bonvenaj. Tiuj kiuj ne havas la tekston ricevos ĝin surloke.

6/10 Pri Carl Nielsen.

Betty Chatterjee gvidos. – Ni legos la duan capitron (paĝoj 10-20) de Mia Fuena Infanaĝo, de Carl Nielsen. Se vi ne jam posedas la libron ĝi estas aĉetebla por 100 kr.

13/10

Pro la aŭtuna ferio ne estos programo.



Ankaŭ ĉi-jare la junularo havis budon ĉe la Roskilde-festivalo. Nuntempe ili servas vegetarajn manĝojn.

UEA ĉe UN pri indiĝenaj lingvaj rajtoj

De la 7-a ĝis la 11-a de julio okazis en Ĝenevo la 7-a sesio de la Ekspertaj Mekanismoj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj (EMRIP). Stefano Keller, estrarano kaj la ĉefrepresentanto de UEA ĉe UN en Ĝenevo, aktivis en la kvintaga evento. Ĝiaj temoj estis alireblo al justico, subteno kaj protektado de la rajtoj de indiĝenaj popoloj, prevento de kaj pretiĝo kontraŭ naturkatastrofoj kaj la evolu-agendo post 2015. Aparte signife estis traktataj la Monda Konferenco pri Indiĝenaj Popoloj kaj la Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj.

Krom fakuloj, parolis reprezentantoj de indiĝenaj popoloj, NRO-j kaj ŝtatoj. Ĉeestis kaj intervenis ankaŭ la Speciala Raportanto de UN pri Indiĝenaj Aferoj, la prezidanto de la Homrajta Konsilio kaj la Vickomisiito de UN pri Homaj Rajtoj. La estrarano de UEA intencis paroli, kun 5-minuta tempodispono, pri la temo Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj koncerne lingvajn rajtojn.

Por trakti la rezoluciprojekton de la Monda Konferenco, necesis tamen atendi ĝian aperon kaj la tradukojn fare de volontuloj de Centro de Dokumentado, Esploro kaj Informado de Indiĝenaj Popoloj (DOCIP), svisa NRO. Pro tio kaj pro videokonektiĝoj kun UN en Novjorko, por kune diskuti la temojn, kaj pro la longeco de la listo de alparolontoj necesis modifi la programon kaj mallongigi la alparoltempon al 2 minutoj. Sekve, Keller devis reredakti sian tekston.

Unue Keller tamen intervenis neantaŭvidite la 9-an de julio post la ricevo de la rezoluci-projekto de la Monda Konferenco. Evidentiĝis, ke ĝiaj koncernaj punktoj (pri komunikado, edukado, justico) ne menciis la uzeblon de gepatra lingvo tie, kie tio estas antaŭkondiĉo de plenrajta kaj adekvata partopreno en la socia vivo. Keller alvokis por inkludigi la necesajn frazojn.

La alia interveno de la estrarano de UEA okazis la 10-an de julio dum la traktado pri lingvaj rajtoj en rilato kun la Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj, kies 13-a artikolo klare difinas ilin,

same kiel la rilatajn devojn de la ŝtatoj. Keller atentigis pri la signifa malkresko de la biokultura diverseco kaj pri la neceso konservi ĝin por la daŭripova pluekzisto. Por tio la protektado de ĉiu lingvo estas grava, speciale tiu de la lingvoj de indiĝenaj popoloj, ĉar ili entenas la sciojn necesajn por konservi la diversecon.

Laŭ la celoj de la Esperanto-movado, Keller atentigis ankaŭ pri la neceso agi kun respekto al la homa digno de ĉiu popolo, tiel ke neniu el la pli potencaj trudu siajn lingvojn kaj kulturojn al la aliaj. Li akcentis la fundamentan rolon de la gepatra lingvo en la vivo de ĉiu kaj ripetis sian alvokon inkluzivi tion en la rezoluci-projekto de la Monda Konferenco, akcentante, ke la vortoj “lingvo” kaj “gepatra lingvo” mankas en pluraj UN-dokumentoj.

Keller partoprenis en paralelaj eventoj, revidis delegitojn konatajn el antaŭaj sesioj de EMRIP, interalie unu el la projekto Indiĝenaj Dialogoj, kaj ekhavis novajn kontaktojn. Li donacis la libron Lingva Genocido en Edukado aŭ Tutmonda Diverseco kaj Homaj Rajtoj de Tove Skutnabb-Kangas al Kenneth Deer, unu el la plej gravaj indiĝenaj aktivuloj. Rezentantoj de NRO-j venis al Keller post liaj alparoloj por esprimi intencon kunlabori. Unu diris, ke komence ŝi ne povis imagi, kion faros UEA en la kunsido, sed post lia alparolo ŝi komprenis, ke esperantistoj subtenas kaj defendas ĉies lingvaj rajtojn.

Keller sidis apud la reprezentantino de Ĉinio. Kiam li proponis al ŝi la ĉinlingvan afiŝon pri la Esperanto-Tago (26 julio), ŝi diris, ke ŝi jam konas ĝin, ĉar ŝia patrino havas ĝin sur la muro! Rezentantojn de Urugvajo li informis pri la baldaŭa ILEI-konferenco en Montevideo.

La du alparoltekstoj de Keller (en pluraj lingvoj), video kaj sonregistraĵoj el la evento troviĝas ĉe: <http://www.linguistic-rights.org/eventoj/>.

Deklaracio de UN pri la Rajtoj de indiĝenaj Popoloj:
http://www.verduloj.org/ind_pop_rajt.htm.

10-a EEU-Kongreso



De la 6-a ĝis la 12-a de Julio okazis en kroata urbo Rijeka la 10-a kongreso de Eŭropa Esperanto Unio, kun la ĉeesto de 7 danaj partoprenantoj. Bedaŭrinde ĝi estis la plej malgranda ĝisnuna EEU-kongreso kun nur 146 partoprenantoj el 21 landoj. Tamen la kongreso bone sukcesis kun tre riĉa enhavo. La asembleo de EEU elektis novan estraron por la sekva 3-ajara periodo. Oni sendis ankaŭ proponon al la estraro de UEA, por ke oni konsideru la eblecon aranĝi la UK de 2016 en Nitra, Slovakio, pro la fakto ke ĝuste en julio 2016 Slovakio prezidos EU. La konsidero estis akceptita de UEA, kion ni povis konstati post la fino de la UK en Bonaero.

La kulturaj programoj estis riĉaj kaj variaj, komencante per kutima folkloro vespero kun popoldancoj kaj kantoj. La ekskursoj estis ankaŭ enhavoplenaj, ĉar la regiono estas ege bela. Entute ege bona kongreso kun agrabla etoso.

Ileana Schrøder


Gustumi la mondon

La 23-an de aŭgusto en la strato Prags Boulevard en Kopenhago la festivalo "Smag verden" (Gustumi la mondon) prezentos al la publiko mikson de monda muziko, internacia strat-manĝo kaj 60 kopenhagaj asocioj – kaj unu el ili estas ni! Pasintjare allogiĝis 40.000 vizitantoj.

Ĉi-jare konferanseos Master Fatman interalie la okcidentafrikan muzikon de Moussa Diallo, la balkanan de Bjonkos Opa Opa Orchestra kaj la mezorientan de Trio Arabesque. Dum la tago okazos vico da eventoj, ekzemple ĉena danco, ĉielarka ĉasado, stilza irado kaj multe pli. Se oni malsatiĝas, la gamo de aĉetebraj manĝaĵoj etendiĝas de argentinaj sandviĉoj tra tajaj rapidmanĝaĵoj ĝis nordia kaĉo.

La festivalo komenciĝis en 2003 sub la titolo Internacia Tago, kaj la esperantistoj havas budon tie de jaroj – origine en Nørrebro, sed ekde la pasinta jaro en Amager.

La eventoj daŭras de la 11-a ĝis la 21-a horo. Plej facile oni atingas la lokon per la metroo, stacio Amagerbro. Eniro kaj (plejparte) partopreno senpagaj. (Vidu ankaŭ la dorspaĝon).



Aperis la Esperanta-dana vortaro pri kiu ni skribis en la pasinta numero. 291 paĝoj, 250 kronoj, aĉetebla ĉe nia libroservo.

Packkoncerto




“Neniam plu milito” estis la devizo post la dezertigoj de la unua mondmilito. Tiun devizon dividas nia kunlaboranto, la Pacministerio (Fredsministeriet). Okaze de la centjariĝo de la militeksplozo ili okazigas senpagan koncerton fare de la Mezorianta Pacorkestro (Middle East Peace Orchestra). Ĝi okazos en la “Kupolo de vizioj” (Dome of Visions) tuj apud la Reĝa Biblioteko ĉe la haveno, Søren Kirkegaards Plads 1 inter la 19-a kaj 22-a horo – en la tago de paco, la 21-a de septembro.

Nova retpaĝo

Dank' al Morten Juhl-Johansen Zólde-Fejér DEA nun havas novan hejmpaĝon kun la eblo lasi komentojn. Ni danke adiaŭas al Tara Gregers, kiu longe estris la hejmpaĝon kaj bonvenigas la novan retestriron Betty Chatterjee. Vidu ekzemple la kalendaron:

<http://esperanto.dk/kalendaro/>

Recenzo



Denove nia libro-servo ofertas al vi libro-trezoron.

Temas pri la proza poemaro La spleno de Parizo verkita de Charles Baudelaire (elp. bodlér), kiu estis originale eldonita en la jaro 1869. La Esperanta versio estis elfrancigita de Paul Lobut kaj eldonita de Eldonejo Koko, Kopenhago en la jaro 1967. La 123-paĝa eldonaĵo estas la oka en la serio “Oriento – Okcidento”.

Charles Baudelaire (1821–1867) estis franca ĵurnalisto, tradukisto kaj verkisto, kies plej fama verko estas “La Floroj de la malbono”.

Baudelaire havis malfeliĉan vivon. La frua forpaso de lia patro profunde afliktis lin, kaj li fariĝis maltrankvilulo. Post siaj lernejoj jaroj en Lyon, li revenis al Parizo, kie li ne tre diligente studis juron. Anstataŭe li diboĉis kaj elspezis la monon de siaj patrino kaj duonpatro. Baudelaire interesiĝis nek pri kariero nek pri burĝa vivo. Li nur volis esti verkisto. Vane la gepatroj penis plibonigi lian vivmanieron. Kvankam li estis drinkulo kaj drogulo li ankaŭ estis tre talenta verkisto. Baudelaire ĉefe asociiĝis kun malriĉuloj, netaŭguloj kaj kompatinduloj, kies vivojn kaj travivaĵojn li priskribis sen kamuflaĵo. Samtempuloj ignoris aŭ eĉ malpermesis liajn verkojn. Baudelaire forlasis la romantikan literaturan tradicion kaj enkondukis la realisman tradicion francan.

“La spleno de Parizo” enhavas kvindek prozajn poemojn, kiuj temas ne nur pri parizanoj en la 1860-aj jaroj, sed ankaŭ pri la propra vivo kaj frustracioj de Baudelaire, kiu konstante alfrontas kaj pensigas la leganton per detale sencenzuraj priskriboj de ĉiutagaj travivaĵoj. Belaj kaj malbelaj.

Septembre 1967 en Dana Esperanto-Bulteno retorike demandis recenzanto de la sama libro: “Kial ni legu pri tiaj oldaj aferoj? Ĉar la sama okazas hodiaŭ!”. Post 47 jaroj mi samopinias; multaj el la temoj ankoraŭ estas aktualaj.

Ekzemple en “La Okuloj de l’ Povruloj” Baudelaire amare riproĉis sian belegan koramikinon. Post tuttaga agrabla kunestado ili sidas ripozante kaj

trinkante ĉe kafejo nova, kiu ŝajnas luksa insulo en “nova bulvardo, ankoraŭ tutplena de rubo kaj jam glore montrante siajn nefinitajn splendorojn.” Eĉ se la belulino ignoras la rubon, kiam haltas malriĉaj preterpasantoj kaj ade fiksrigardas la luksaĵojn kaj la riĉulojn, tiam ŝi petas al Baudelaire, ke li plendu al la kafejestro, ĉar “Tiuj uloj estas netolereblaj por mi, kun siaj okuloj apertaj kiel portaloj.”

Nu, ni povus longe pripensi la kontrastojn inter nia luksa vivmaniero, kaj tiu de aliaj. Ni ankaŭ televidile aŭ komputile preterpasadas unu la alian.

Kia estas la lingvaĵo? Ĝi povas esti defia, ĉar interalie “La tradukinto klopodis konservi la pli ol 100-jaroldan stilon, kio metas nin en animstato, kiu estas necesa por kompreni la animstaton de Baudelaire kaj liaj samtempuloj, kiuj penis, kuraĝis, rompi la rigidajn moralkompleksojn de sia tempo.” (Dana Esperanto-Bulteno, septembre 1967).

Cetere proza poemo estas nek prozo nek poemo sed hibrido, kaj oni konsideras ĝin aparta genro. Ili estas rakontoj, kiuj enhavas multajn metaforojn. Ankaŭ H. C. Andersen verkis prozpoemojn:

http://en.wikipedia.org/wiki/Prose_poetry

Ĉu “La Spleno De Parizo” estas aĉetinda kaj leginda? Memevidente!

En 1967 la prezo estis 25 danaj kronoj, kaj ĝis la fino de 2014, la prezo por vi, kara bonŝanca abonanto de 'Esperanto en Danio' estos – la sama, 25 danaj kronoj.

Betty Chatterjee

Laste aperis

Triesto, inter Karsto kaj Maro – Magiaj itineroj

Elda Doerfler. Trieste: Triesta Esperanto-Asocio. Dec. 2013. 108 p. Bind. Kun koloraj fotoj. Gvidlibro pri Triesto, kun ĝia konciza historio kaj priskribo de la plej interesaj vidindaĵoj en la urbo kaj en ĝiaj ĉirkaŭaĵoj.

€ 12,00 plus sendokostoj (minimume 6 € al eksterlando). Kontakt-adresoj: esperantotrieste@yahoo.it testudo.ts@gmail.com

Artaj konfrontoj en Pollando



Ĉu vi pretas dediĉi la lastan septembran semajnfinojn al Esperanto-kulturo, arto kaj scienco?

**26-28. septembro 2014: 30-aj ARTAJ KONfrontoj en ESperanto
“ARKONES”**

1. Programo

Kristaliĝas programo de la ĉi-jaraj Konfrontoj. Ĝi estos plena de prelegoj, koncertoj, prezentaĵoj kaj elpaŝoj. Indas viziti nian retejon por legi la plenan programon en ĝia aktuala formo.

La granda stelulo de la Miela Vespero estos la grupo KAJTO.

Aktualigata programo troveblas en nia retejo.

2. Tria Interlingvistika Simpozio 25-26. de septembro

Problemoj de internacia lingva komunikado kaj iliaj solvoj. Indas kombini sian partoprenon en “ARKONES” kun tiu grava evento. Partopreno estas senkosta. Detaloj kaj aliĝo:

<http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/interlingvistiko/simpozio2014.html>

Interlingvistikaj Studoj: nova starto. Nova starto de la plej kompletaj studoj pri Interlingvistiko, kiu funkcias ekde 1998. En septembro 2014 startos nova grupo. Kandidatoj el la tuta mondo estas bonvenigataj. Postulo: bona kono de Esperanto (min. nivelo B2) kaj baza kono de la Esperanta kulturo, baza diplomo pri superagradaj studoj. Aliĝdato: 15.08.2014. La unua sesio okazos inter la 20-24.09.2014.

Informoj: <http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/interlingvistiko/index.html>



3. Aliĝo kaj loĝebloj

Eblas aliĝi malmultkoste antaŭ la aranĝo pere de la reta aliĝilo:

<http://www.arkones.org/partopreno/aligilo>

Kotizoj ekde 15 eŭroj (45 zł por poloj). Pluraj rabatoj!

Loĝigo en Junulargastejo Cinnamon ekde 5 eŭroj inkluzive matenmanĝon.

Ne forgesu inviti nianome aliajn esperantistojn en via urbo!

Amike via,

Tobiasz Kaźmierski

+31-641010695

<http://www.arkones.org>

[dejo-dk]

Vivtragedio de Zamenhof

D-ro L.L. Zamenhof naskiĝis en urbo Bialystok, Pollando (1859-1917). Li estas aŭtoro de lingvo Esperanto (1887) kaj de la verkoj Hilelismo (1901) kaj Homaranismo (1906) pri tuthomara harmonio. Al agado por ĝia realigado li dediĉis sian tutan vivon. La jaro 1914 fariĝis por li vivtragedio.

La 26-an de julio 1914 devis okazi en Parizo jam la 10-a Universala kongreso de lia lingvo Esperanto. Por ĝi aliĝis 3.739 esperantistoj el la tuta mondo. Sed ĝuste en tiu-ĉi tago eksplodis la unua mondmilito, pro kio tiu-ĉi kongreso ne povis okazi.

Por Zamenhof tio estis vivtragedio, ĉar li subite devis ĉesigi sian aktivadon por tiu ĉi sia vivmisio. Tamen li ne rezignis. Malgraŭ sia grava kormalsano, li baldaŭ komencis prilaboradi novajn konceptojn por plibonigado de la aferoj tuthomaraĵ, realigotajn post tiu ĉi terura mondmilito.

Li estis konvikita, ke ĝia unua, tiacela parto – ebligonta bazan unuecon en diversecoj lingvaj, per lia Esperanto – havas jam firman fundamenton kaj tial ĝi en la tuta mondo plue disvastiĝados. Tial li sentis necese plene koncentrigi sian strebadon, por kreado de ĝia necesa, dua parto: kreado de la unueco en diversecoj religiaj kaj etikaj.



La tombo de Zamenhof en Varsovio

Tiacele li faris preparojn por kunvoki – tuj post la milito – kongreson por neŭtrala, tuthomara religia fundamento, universale akceptebla. Li aplikis en ĝin eĉ la ĉefajn ideojn el sia Hilelismo kaj Homaranismo. Komplekse li celis: starigi neŭtrale homan, etikan regularon, kiu kapablu fari “el homoj homojn”. Ĝia ĉefa maksimo, rekonata en ĉiuj religioj, devus esti: “Agu kun aliuloj tiel, kiel vi deziras, ke ili agu kun vi!” El ĝi eblas ja dedukti la maksimumojn ceterajn.

Precipe li akcentis edukadi – laŭ tiu ĉi universala etika regularo – la tutmondan junularon. Post nur kelkaj generacioj, povus la homaro transformi ĉiujn detruilojn en konstruilojn. Tiel eblus akiradi financajn rimedojn por komuna tuthomara fondaĵo, celanta plibonigadi la vivsituaĵojn de bezonuloj, laŭeble preventi naturkatastrofojn kaj la tamen okazantajn rapide finance kompensadi.

Esperanto-gazetoj publikigis en 1915 la Zamenhofan “Alvokon al la diplomatoj” en kiu Zamenhof interalie proponis fondon de “Unuiĝintaj ŝtatoj de Eŭropo”. Certa modifio de tiu ĉi lia propono – nur post la dua mondmilito kaj post penaj strebadoj – fariĝis la Eŭropa Unio. Bedaŭrinde ekzistas skeptikuloj, kiuj kritikas ĝin, eĉ emus likvidi ĝin ...

Kontraŭe esperantistoj, povus pliperfektigadi kaj pliampleksigadi ĝian evoluon. Tiacele ekestis esperantlingva koncepto por: “Kreado de baza unueco en multkultura Eŭropa Unio.” En ĝi estas plene aplikataj la Zamenhofaj ideoj kaj instigoj por tuthomara harmonio.

En la jaro 2014 efektiviĝadas tristaj rememoroj je la 100-jara datreveno de eksplodo de la unua mondmilito. En Esperantio krome okazos ankaŭ specialaj rememoroj je la trista datreveno de la Zamenhofa vivtragedio, okazinta en tiu ĉi jaro. Dum ĝi ni penetradu en la tiamajn Zamenhofajn tristajn sentojn. Espereble ni tiamaniere akirados novajn inspirojn por tuthomare akceligi realigadon de la kompleksa, Zamenhofa vojo al tuthomara harmonio kaj tutmonda paco.

Jaroslav Karhan, 15.12. 2013.

Esperanto-TV petas vian helpon

Novan, pli rapidan servilon por Esperanto-TV!

Esperanto-TV, ETV, estas projekto por distribui altkvalitajn Esperantajn filmojn per moderna interreta teknologio. La projekto startis en aprilo 2014, ekde tiam produktis kaj distribuis multajn filmojn (averaĝe ĉirkaŭ 30 minutojn ĉiutage). La elsendoj estas atingeblaj en senstopa reĝimo ĉe <http://www.esperantotv.net>, kie estas deponataj kaj spekteblaj ankaŭ la antaŭaj filmoj.

La nuna, unua, enkonduka fazo de la projekto sukcesis, fakte ĝi jam ricevas kunlaboraĵojn de la tuta mondo kaj la kanalo estas pli kaj pli konata. Tiu fazo estas ankoraŭ youtube-stila, por ebligi la spektantojn ĝui la programaron sen problemoj de elsendo aŭ tempo.

En la dua fazo ETV iĝos la vera servo, pro la ebleco rekte elsendi materialojn kaj gravajn eventojn, kiel ekzemple naciajn kaj internaciajn kongresojn. En la dua fazo, fakte, la televid-kanalo estos elsendata per tre rapida Interreto kun IPTV-teknologio, spektebla ne nur per komputilo sed ankaŭ per novaj televidaparatoj kaj poŝtelefonoj. La tria fazo celas resume instingi la kreskon de la Esperanta filmindustrio kaj kinarto.

La unua fazo estis atingita per la propraj fortoj de la skipo, sed la sekva fazo ne estas same atingebla pro pli pezaj kostoj – kaj la skipo de ETV turnas sin al vi kun peto de helpo akiri propran servilon – anstataŭ la ĝis nun luata malnova aparato.

Detaloj ĉe la alvoko estas legeblaj ĉe:

<https://www.indiegogo.com/projects/servilo-por-esperanto-tv-server-for-esperanto-tv>

Dankon pro via helpo kaj kontribuo.

[ret-info]

Wikipedio atingas 200.000 artikolojn

Se vi malesperas pri la nombro de esperantistoj en via tuja najbareco, jen por vi kelkaj kuraĝigaj informoj, kunmetitaj de Lu Wunsch-Rolshoven, pri la stato de Esperanto aktuale kaj tutmonde:

Sian 200.000-an artikolon la Esperanta Wikipedio atingis meze de aŭgusto 2014. Esperanto per tio okupas la 33-an lokon inter la unuopaj lingvoversioj de la wikipedio. (Por komparo: La slovaka versio havas proks. 194.000 artikolojn, la dana proks. 190.000.)

La Esperanto-wikipedio estas ofte uzata enciklopedio de la Esperanto-parolantoj, kiuj nuntempe troviĝas en pli ol 120 landoj tutmonde; speciale por lernantoj kaj studentoj ofertiĝas alloga reto de kontaktoj. Oni taksas, ke pluraj centmiloj da homoj regule parolas Esperanton, kelkaj milionoj supozeble lernis Esperanton. En kelkaj lastatempe okazis rimarkinda kresko, ekzemple en Hungario, kie la ŝtata censo por la du pasintaj jardekoj konstatis kvarobliĝon de la nombro de Esperanto-parolantoj – en 1990 oni kalkulis 2083 Esperanto-parolantojn, por 2011 rezultis 8397 Esperanto-parolantoj, por 985 el ili Esperanto estas familia aŭ denaska lingvo.

Angla Wikipedio en Esperanto-traduko


La projekto WikiTrans disponigas la anglalingvan wikipedion en maŝina Esperanto-traduko. Tie oni ofertas proks. 4,3 milionoj da artikoloj en Esperanto. Dank' al la simpla kaj regula lingvostrukturo de Esperanto tiu maŝina traduko estas relative bone legebla. La projekto estas ofertata de GramTrans; maŝinajn tradukojn de unuopaj Esperanto-tekstoj cetere ofertas ankaŭ Google Translate kaj Apertium.

SMAG VERDEN GADEFEST

100 STREET EVENTS FRA HELE VERDEN
GOURMET-RET FOR KUN 45,-
MUSIK: DANCEHALL, BALKAN, AFRO, LATIN, ORIENTALSK MM



PRAGS BOULEVARD
23. AUGUST 11-21



GRATIS ADGANG

